

# Kial L.L. Zamenhof ne estis polo kaj kial Esperanto ne estas nur pola nacia heredaĵo

Materiaj kaj nemateriaj konsideroj kaj argumentoj  
kontraŭ la uzurpado de Esperanto  
kiel pola kultura heredaĵo kaj de Zamenhof kiel polo

*de Andreas Künzli*

## Enkonduko

En preskaŭ ĉiu informa prospekto pri Esperanto kaj ankaŭ en sciencaj verkaĵoj oni kutime povas legi, ke la internaca lingvo Esperanto aperis en Pollando kaj ke ĝia aŭtoro, L.L. Zamenhof, estis „pola“ okulkuracisto, do polo. Ĝis nun ne nur la esperantistoj, sed ankaŭ la ĝenerala publiko volonte kredis tiun version, aŭ interpreton, des pli la poloj mem, ĉar ion alian ili ne konis aŭ ne povis imagi kaj pri io alia ili ankaŭ ne tro interesiĝis. Dum la Esperanto-movado jam delonge ĉesis aprezi Zamenhofon kiel judon (ĉar la Esperanto-movado ne deziras esti identigita kiel juda afero), la *poleco* de Zamenhof kaj Esperanto formas du integrajn mitojn kaj legendojn de la Esperanto-movado kaj -propagando, kiujn neniu emas pridubi aŭ kuraĝas kritiki.

Ĉi tiu ‘pola’ percepto de Zamenhof kaj Esperanto estiĝis supozeble pro jenaj du esencaj kaŭzoj: Propaganda efiko kaj malmultaj scioj aŭ konoj pri tiu ĉi temo. Povas esti, ke krom tio ankaŭ malinteresiĝo, indiferenteco, ideologio kaj subkonscia antisemitismo (kiu en Eŭropo daŭre ekzistas) ludas ian rolon. Tiaj sintenoj kaj konceptoj povis faciligi la disvastiĝon de mitoj kaj legendoj, duonveroj kaj mensogoj, kiuj kondukis al la pli malpli intencita prisilentado kaj ekskludo de la judeco de Zamenhof ĉefe en prospektoj, informiloj kaj libroj, aŭ en oficialaj rezolucioj de la Esperanto-movado.<sup>1</sup> Por kaŝi la judajn radikojn de Zamenhof oni uzurpis lin kiel polon kaj faris el judo kvazaŭ maljudon.<sup>2</sup> Sed ne nur la poloj kulpas pri tio. Ĉi tiun identecan perfortadon de Zamenhof (ke ĝi estas neakceptebla estas memkompreneble) praktikadis principe ĉiuj aliaj. Neniu protestis/as aŭ kritikis/as, plej malmultaj tiuj mem, kiuj laŭte pledas por homaj, minoritataj kaj lingvaj rajtoj kaj kiuj adoras Zamenhofon kiel majstron kaj guruon, do ŝajnas, ke la simpligaj stereotipoj estis akcepteblaj.

Ke la poloj havas tradicie malfacilan rilaton al la judoj, estas konate, kaj tio respeguliĝas ankaŭ en polaj informoj pri Zamenhof kaj Esperanto. En oficialaj informiloj de la pola Esperanto-movado indikoj pri la judeco de Zamenhof kutime mankas, kaj atentigoj pri aliaj same esencaj aspektoj de la zamenhofa identeco raras aŭ tute ne ekzistas.<sup>3</sup> La pola societo EDE-PL, kiu estas la motoro de la nuna kampanjo celanta akceptigi Esperanton kiel „nematerian kulturen heredaĵon de Pollando“,<sup>4</sup> sufiĉe elegante solvis la

<sup>1</sup> Ekzemple en la bjalistoka UK-rezolucio de la jubilea jaro 2009, kiu estis verkita de personoj, kiuj perfekte konas la judan fonon de Zamenhof (cetere poloj ne partoprenis en ĝia verkado). La aŭtoro de ĉi tiu teksto opinias, ke en tiu rezolucio oni maltrafis taŭgan ŝancon kaj momenton por inde kaj digne honori la judecon de Zamenhof kaj do rekompenci la prisilentadon de lia judeco, kiun oni sisteme praktikadis dum jardekoj. PS 2015: Alia ekzemplo estas la teksto publikigita sub

<http://www.uea.org/aktuale/komunikoj/2015/Propono-prifesti-la-Zamenhof-datrevenon-progresas-cxe-Unesko>, kiu ilustras jenan fenomenon: Por eviti la emfazon, ke Zamenhof estis judo, oni preferas indiki la polan version de lia nomo („Ludwik Zamenhof“) kaj indiki, ke la „Unua Libro“ aperis en la rusa lingvo.

<sup>2</sup> La unuaj, kiuj klasifikis Zamenhofon kiel polon, estis ĝuste Antoni Grabowski, Adam Zakrzewski kaj J. Baudouin de Courtenay. Kiel en ĉiuj aliaj „realsocialismaj“ landoj, kiuj estis ŝtate kontraŭ-cionisme orientitaj, ankaŭ en Pollando oni evitis emfazi aŭ eĉ nur mencii la judecon de Zamenhof, des pli post la kruda antisemitisma kampanjo en 1967/8 de Moczar. Sendube, ekzistis/as ankaŭ kelkaj polaj esperantistoj (kiel Walter Żelazny kaj Tomasz Chmielik), kiuj ne apartenas al tiuj poloj, kiuj celis prisilenti aŭ ekskludi la judecon de Zamenhof en siaj verkaĵoj, sed kiuj male konsciis kaj ripete atentigis pri ĝia signifo por la ideo de Zamenhof kaj de la lingvo Esperanto.

<sup>3</sup> Vd. ekzemple <http://www.esperanto.pl/?q=pl/node/38>. Mi suspektas, ke la krudan ignoradon de la judeco de Zamenhof oni faras kun intenco, ĉar la koncernaj aŭtoroj, kiuj verkis tiajn tekstojn, estas tre bone informitaj pri ĝi.

<sup>4</sup> Informojn pri la kampanjo vd. sub <http://www.e-d-e.org/Esperanto-aldonigxis-al-la-Pola> kaj <http://www.ede.esperanto.info.pl/index.php?id=aktualnoscj>. Reagojn kaj konfuzojn en Eo-medioj vd. sub <http://sezonoj.ru/2014/11/pollando-2> kaj

problemon de la identeco de Zamenhof, trovinte jenan formulon sur la koncerna retpaĝo: „Ludwik (sic) Zamenhof naskiĝis en 1859 en Bjalistoko. Du trionoj de la loĝantoj de lia naskiĝurbo estis judoj. Loĝis tie ankaŭ poloj, rusoj kaj germanoj.“<sup>5</sup> Komento superflua.

Esperantistoj strange kaj alergie reagas, se oni pridubas la polan originon de Esperanto, se oni kritikas ĝian polan ekskluzivecon kaj se oni nete rifuzas la ideon, ke Esperanto ne povas esti konsiderata kiel pola heredaĵo. Por pravigi la polecon de Zamenhof kaj de Esperanto kutime servas kaj sufiĉas al la propagandistoj la argumentoj, ke Zamenhof naskiĝis en Bjalistoko kaj vivis en Varsovio, do en Pollando, ke li parolis la polan lingvon kaj ke Esperanto estis publikigita en Varsovio. Certe, la aferoj estas pli komplikaj, kiel mi volos montri en la sekva analizo.

## I. `OBJEKTIVAJ` FAKTOROJ

### 1. Historiaj, politikaj-ŝtataj kaj etnaj/kulturaj cirkonstancoj koncerne Pollandon en la aperotempo de Esperanto

#### 1.1. Historiaj, politikaj kaj juraj aspektoj

Kiam L.L. Zamenhof vivis kaj publikigis sian Lingvon Internacian (de d-ro Esperanto), Pollando ne ekzistis kiel sendependa ŝtato. Fine de la 18a jarcento la teritorio de la Pola-Litova Regno<sup>6</sup> estis disdividita inter la absolutismaj-imperiismaj potencoj de Prusujo, Aŭstrujo kaj Ruslando, tiel ke tiu unika komuna respubliko en 1795 komplete malaperis de la eŭropa mapo. La teritorio de Pollando-Litovujo estis ŝovita en komplika divida kaj aneksa procezo, Varsovio kaj Bjalistoko fariĝis partoj de Prusujo.<sup>7</sup> En 1806, Napoleono I. Bonaparte iniciatis la kreon de nova „Varsovia Duklando“ kun la saksa reĝo Frederiko Aŭgusto I. kiel ŝtatestro.<sup>8</sup> Sed tiu franca satelita bufro-ŝtato fiaskis en la milito kun Ruslando, kiu okupis Varsovion en 1813, kun la falo de la franca militisto kaj de ties ordo kaj kun la abdiko de la saksa reĝo. Laŭ la volo de la Viena Kongreso, kiu restarigis la monarkion en Pollando, en 1815 estis kreita la t.n. „Pola Reĝlando“ (nomata ankaŭ „Kongresa Pollando“<sup>9</sup>). Kvankam teorie ĝi estis aŭtonoma ŝtato kun propra konstitucio, kiu garantiis nacian parlamenton kaj diversajn rajtojn kaj liberecojn, tiu nova pola kreaĵo estis ligita kun la ruslanda imperio per persona unuiĝo (kio signifas, ke la rusa caro estis samtempe ankaŭ reĝo de Pollando<sup>10</sup>) kaj do sekve troviĝis longan tempon sub rusa kontrolo. Kiam en 1830 kaj 1863 eksplodis polaj ribeloj, kiujn la poloj finfine perdis, la rusoj rigore traktis la polojn, kiuj pli kaj pli perdis ankaŭ la aŭtonomiajn rajtojn, kiujn la konstitucio garantiis al ili (sed tiu konstitucio montriĝis pura farso, ĉar la rusoj malrespektis kaj rapide eksvalidigis ĝin). En 1867 la pola reĝlando administre integriĝis kiel parto de la ruslanda imperio kaj estis reorganizita laŭ dek gubernioj. Kvankam la nomo „Pola Reĝlando“ restis oficiale konservita, la rusaj administrantoj pli kaj pli ofte uzadis la terminon „Vistula lando“ por tute forviŝi

---

<http://www.liberafolio.org/Members/AlKo/kio-estas-esperanto-pola-nacia-heredaĵo-1#1416773006451621>. Polaj informfontoj: <http://www.tvp.pl/bialystok/aktualnosci/kultura-i-sztuka/esperanto/17785309>, <http://nowinylokalne.pl/esperanto-na-liscie-niematerialnego-dziedzictwa-kulturowego-polski> kaj <http://dziendobry.bialystok.pl/esperanto-na-liscie-niematerialnego-dziedzictwa-kulturowego>. Ĉi-rilataj oficialaj retujoj <http://niematerialne.nid.pl> kaj <http://www.mkidn.gov.pl/pages/the-ministry-of-culture-and-national-heritage.php?lang=EN> (informojn serĉu laŭ la frapvorto „Esperanto“).

<sup>5</sup> Vd. ([http://esperanto.info.pl/index.php?id=125\\_lat\\_esperanto](http://esperanto.info.pl/index.php?id=125_lat_esperanto)). Sed ankaŭ en tiu ĉi kazo oni devas konstati, ke la judeco de Zamenhof ne estas eksplicite menciita. (Okulfrapas ankaŭ jenaj detaloj: Por la nomo de Nikolaj Borovko estas uzata la pola ortografio, kvankam li ne estis polo. Kaj sur certaj rusaj Esperanto-retpaĝoj kiel <http://sezonoj.ru/2014/12/masi-12>, 3a alineo, oni celas ŝajnigi, ke Zamenhof estis ruso, nomante lin Lazar' Markoviĉ Zamenhof, kiel li efektive nomiĝis laŭ rusa kutimo. Aliaj manieroj de uzurpado! Iom stranga afero, ĉar esperantistoj volonte asertas, ke ili estas sentemaj pri lingv(istik)aj nuancoj kaj volas eviti nacilingvajn trudojn kaj miskomprenojn, sed uzante tiujn nomformojn, ili ĝuste faras kaj kaŭzas tion.)

<sup>6</sup> Mapon vd. sub <http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/e/eb/Irp1569.jpg>.

<sup>7</sup> Mapon vd. sub [http://www.ggstanko.de/Geschichtliches/Hohenzollern/Teilung\\_Polens/TeilungP2.jpg](http://www.ggstanko.de/Geschichtliches/Hohenzollern/Teilung_Polens/TeilungP2.jpg) aŭ <http://www.auslandsdienst.pl/3/24/Artykul/92126.Friedrich-II-und-Polen-Ein-R%C3%A4ubergeburtstag>.

<sup>8</sup> Mapon vd. sub [http://de.wikipedia.org/wiki/Herzogtum\\_Warschau#mediaviewer/File:Herzogtum-Warschau.png](http://de.wikipedia.org/wiki/Herzogtum_Warschau#mediaviewer/File:Herzogtum-Warschau.png).

<sup>9</sup> Mapon vd. sub [http://de.wikipedia.org/wiki/Kongresspolen#mediaviewer/File:Karte\\_kongresspolen.png](http://de.wikipedia.org/wiki/Kongresspolen#mediaviewer/File:Karte_kongresspolen.png). Tekston (germanlingvan) de la tiama konstitucio vd. sub <http://www.verfassungen.eu/pl/verf15-i.htm>.

<sup>10</sup> Temas precipe pri Aleksandro I. (1815-25), kiu subskribis la polan konstitucion de 1815, kaj Nikolao I. (1825-55), kiu kroniĝis kiel reĝo de Pollando. La postaj caroj funkciis kiel formalaj ŝtatestroj de Pollando, kiu jam perdis sian aŭtonomecon en 1831/1867. La „vicreĝo“, kiu oficis kiel ĉefministro de la Pola Reĝlando de 1815 ĝis 1867, estis anstataŭigita per „ĝenerala guberniestro de Varsovio“, kiu oficis ĝis 1916.

la vorton „Pollando“, kies renaskiĝon kiel ŝtato kaj nacio la rusoj volis nepre eviti. Tia estis la statuso, aŭ politika realeco de „Pollando“ en 1887 kaj en la posta periodo, kiam Esperanto estis publikigita kaj disvastigita de L.L. Zamenhof, kiu naskiĝis en 1859, kiam ankoraŭ regadis la pli liberalisma ´reform´-caro Aleksandro II, kiu konsentis aboli la servutan sistemon en Ruslando. Sed en 1887 Ruslando jam estis regata de caro Aleksandro III., granda malamiko de poloj kaj judoj, sinistra aŭtokrato, kiu tre malmole reagis post la murdo kontraŭ sia patro Aleksandro II., kiu estis efektivigita en 1881 de la ´revolucia opozicio´, al kiu apartenis krom rusoj ankaŭ poloj kaj judoj. Helpata de fanatikaj naciismaj kaj konservemaj reakciuloj kiel K.P. Pobedonoscev, N.P. Ignat´ev kaj V.K. von Plehve, kiuj signife influis kaj formis la konkretan ŝtatan politikon de Ruslando, Aleksandro III. enkondukis novan polican reĝimon, kiu ricevis la ordonon radikale kontraŭbatali ĉion, kio subfosis aŭ minacis la pluekzistadon de la cezaropapisma diktaturo de la despotisma romanova dinastio, kiu interne pli kaj pli rapide putris kaj degeneris. Al tiu destina politiko por savi la regnon apartenis ankaŭ la krude akcelata rusigo de diversaj nacimalplimulto, kiu estis senindulge efektivigata eĉ malgraŭ la firma rezisto de la koncernaj nerusaj popoloj. La „pola demando“ kaj la „juda demando“ ankaŭ ne estis solvitaj de la sekva caro Nikolao II., kiu kondukis Ruslandon en la katastrofon de la unua mondmilito kaj en la ruslandan revolucion, kiu faligis la carismon kaj konkludiĝis per la bolŝevisma ŝtatrenverso en Sankt-Peterburgo, la ĉefurbo de la ruslanda imperio, en 1917.<sup>11</sup>

Lige kun la statuso de Pollando kiel dependa provinco kaj integra parto de la ruslanda imperio ankaŭ ne ekzistis pola civitaneco. Do, la poloj, judoj kaj litovoj fariĝis subuloj de la rusa caro, ankaŭ L.L. Zamenhof kaj liaj familianoj en tio ne estis escepto.<sup>12</sup> En 1918 Pollando estis restarigita kiel sendependa nacia ŝtato, en kiu ĉiu loĝanto ricevis la polan civitancon, ankaŭ la judoj, kaj la infanoj de Zamenhof. Sed L.L. Zamenhof mem, kiu forpasis en aprilo 1917, ne plu povis fariĝi pola ŝtatano.<sup>13</sup>

## 1.2. Etnaj, (soci-)kulturaj kaj (soci-)politikaj aspektoj

Ene de la historiaj limoj de tiama Pollando necesas distingi la ekzistadon de tri ĉefaj kulturoj, etnoj, gentoj (kiel diris Zamenhof) aŭ naciaj unuoj, kiuj vivis kune sed tamen en forta antagonismo, aŭ konkurenco kaj parta mal/amikeco inter si: Temas pri la poloj, judoj kaj rusoj (aliajn kiel litovojn, blankrusojn, ukrainojn, tatarojn, germanojn mi ne konsideras en ĉi tiu studo). Tiuj tri ĉefaj naciaj unuoj ne nur ekzistis unu apud la aliaj sed praktike ankaŭ havis nenion komunan en etna, kultura, lingva, historia, religia, filozofia kaj politika rilatoj, apenaŭ rilatis inter si (kvankam inividuaj kontaktoj nature ĉiam ekzistis en la ĉiutaga vivo) kaj ankaŭ ne intermiksiĝis (kvankam iuj kazoj de miksitaj geedziĝoj certe ekzistis). Politike kaj ekonomie, la interesoj de tiuj naciaj grupoj ege diverĝis: La rusaj regantoj intencis administri, kontroli, subjugi kaj ekspluati la polan landon, la poloj celis restarigi siajn nacian suverenecon kaj ŝtatan sendependecon, kio inkluzivis la revivigon de la polaj lingvo kaj kulturo, kaj la judoj, kies ĉeesto estis nur tolerata de poloj kaj rusoj kaj kiuj troviĝis en embarasa situacio inter tiuj du grupoj, havis antaŭ ĉio ekonomiajn kaj komercajn celojn (ĉar aliajn profesiojn ili ne povis plenumi) kun eventuala deziro ricevi protekton kiel rifuĝintoj kaj fariĝi integra sed aŭtonoma parto de la ruslanda/pollanda socio. La emancipiĝon de la judoj malhelpis la cirkonstanco, ke ili vivis en aparta loĝzono, kiu estis speciale instalita por ili kaj reguligita de la caroj, kaj kiu aspektis kvazaŭ kiel giganta internacia malliberejo aŭ geto, kiun la judoj ne rajtis forlasi.<sup>14</sup> Kvankam tiuj popoloj vivis en la sama lando de jarcentoj pli malpli en paco (kiu estis ĝenata precipe de la intrigoj de la romkatolika eklezio, de tempo al tempo de iuj kontraŭjudaj politikistoj aŭ de ukrainaj kozakoj), la rilatoj inter poloj kaj judoj restis malfacilaj. Sed precipe ĉirkaŭ la jaroj 1830/31 okazis diskuto inter poloj pri la demando, ĉu la judojn eblas konsideri kiel parton de la pola *nacio* (= pli granda unuo ol nur la etno), en politika senco. Ĉi tiu demando estis klare aprobata de kelkaj elstaraj figuroj de la publika vivo kiel la fama poeto Adam Mickiewicz kaj de la historiisto Joachim Lelewel, ambaŭ polaj patriotoj kaj adeptoj de la klerismo, kiuj opiniis, ke la judoj estas iusence la naturaj

<sup>11</sup> Mapon de la Ruslanda Imperio vd. sub <http://www.si-games.com/forum/showthread.php?t=26569>.

<sup>12</sup> Do, la kreinto de Esperanto neniel estis „pola civitano“, kiel G. Sutton strange notis en sia Enciklopedio pri la Esperanto-literaturo en la koncerna artikolo de sia libro, ĉar pola civitaneco ne ekzistis. En ĉi tiu rusa filmo <https://www.youtube.com/watch?v=md11986GICk> (ek de min. 2:45) Zamenhof estas prezentita kiel „civitano de la Ruslanda Imperio“, la etnoj en Bjalistoko estas listigitaj laŭ jena vico: rusoj, poloj, litovoj, germanoj, judoj.

<sup>13</sup> Ĉar ankaŭ Litovio kaj Ruslando/RFSFR estis restarigitaj kiel naciaj ŝtatoj, pro diversaj konsideroj Zamenhof estus povinta teorie fariĝi eventuale ankaŭ rusa aŭ litova ŝtatano (kial tio vd. sube), sed kontraŭ tiu ĉi opcio nature parolas la argumento, ke la zamenhofanoj vivis en Pollando kaj ne en Litovio aŭ Ruslando.

<sup>14</sup> Mapon vd. sub [http://eo.wikipedia.org/wiki/Setla\\_zono](http://eo.wikipedia.org/wiki/Setla_zono).

fratoj de la poloj. Ankaŭ flanke de la judaj gvidantoj ekzistis kelkaj protagonistoj de la kunlaboro kun la poloj. La situacio draste ŝanĝiĝis kaj malboniĝis, kiam post 1867 Pollando (kiel provinco de la rusa imperio) estis inundita de amaso da judaj rifuĝantoj kaj elmigrantoj el aliaj partoj de la regno, kie ili estis persekutitaj en diversaj kontraŭjudaj pogromoj, kaj kiuj komencis ekonomie konkurenci la polojn. La espero de la caroj kaj de la „pozitivistoj“, ke la judoj asimiliĝos en Pollando kaj Ruslando, ne plenumiĝis. Polo povis fariĝi nur tiu homo, kiu plenumis certajn naturajn kondiĉojn aŭ kriteriojn, kaj tiujn kondiĉojn, ekzemple religia konvertiĝo, la judoj ne povis plenumi, ĉar tiuj kondiĉoj ne estis akcepteblaj por la popolo de Moseo, kiu insistis resti lojala al siaj tradiciaj vivleĝoj kaj kutimoj.<sup>15</sup> Do, ĉefe religiaj-kulturaj motivoj kaŭzis, ke la integriĝo aŭ asimiliĝo de la judoj en la pola aŭ rusa socio fiaskis, kompare kun Germanio kaj aliaj okcidentaj landoj, kie tiu procezo estis pli sukcesa. Tio praktike signifis, ke la judoj restis ekster la pola nacio/socio kaj ĉiu etno aŭ nacio daŭrigis vivi aparte: judoj, poloj, rusoj. Do, ne nur la kulturaj diferencoj kaj la diferencoj de la interesoj estis tro grandaj, sed ankaŭ la reciprokaj malŝato kaj malfido inter la etnoj, des pli sub la kondiĉoj de la kreskanta (pola, litova) naciismo kaj (rusa) ŝovinismo, kio malhelpis la emancipiĝon, integriĝon kaj asimiliĝon de la judoj. La lingva diverseco verŝajne eĉ ne ludis la ĉefan rolon, ĉar en tiu multkultura socio ĉiu iomete konis la lingvon de la aliaj por komuniki kun ili.

### 1.3. Bjalistoko

Kvankam Bjalistoko, la naskiĝurbo de L.L. Zamenhof (1859-1917), estas nuntempe integra parto de Pollando kaj konsiderata kiel tute pola urbo, en la historio tio ne ĉiam estis tiel. Kiel multaj (iam) pluretnaj urboj en orienta Eŭropo, ankaŭ Bjalistoko, kiu estas tipa ekzemplo por tiu ĝenro, estas iom speciala kazo kun aparta historio, ĉar ĝia situo inter aŭ ĉe kelkaj landlimoj, kiuj reprezentis samtempe ankaŭ la limon de diversaj kulturoj, estis kaŭzo por ŝanĝiĝantaj apartenecoj, posedecoj kaj regadoj. Do, ĉiukaze la historio de Bjalistoko estas sufiĉe interesa. La etimologio de Bjalistoko havas polan kaj litovan versiojn, tiel ke kaj poloj kaj litovoj eĉ pretendas, ke Bjalistoko estas origine ilia urbo.<sup>16</sup> Certe, en la fonda tempo de Bjalistoko (14a jc., 1320) litovoj ludis la ĉefan rolon, sed ankaŭ la vero estas, ke en postaj jarcentoj iuj polaj, poliĝintaj aŭ poligitaj litovaj dinastioj (ĉar en tiu tempo okazis la procezo de la poliĝo de la litova nobelaro) konsideris la urbon (tiam ankoraŭ tre malgrandan, kiu en 1691 ricevis la statuson de urbo) kiel sian posedadon, aŭ teritorion. Ĉiukaze, Bjalistoko estis parto de la „Respubliko de Ambaŭ (aŭ Du) Popoloj“ (pole: Rzeczpospolita Obojga Narodów, litove: Abiejų Tautų Respublika / Žečpospolita) kaj situis sur la flanko de la litova grandprinclando, sed en 1569, okaze de la Lublina Unio, Bjalistoko kaj la vojevodio de Podlaĥio transiris al la suvereneco de la Krono.<sup>17</sup> El kulturhistoria-etnografia vidpunkto, la regiono ĉirkaŭ Bjalistoko mem nomiĝas Podlaĥio (ĉu Zamenhof do estis ankaŭ podlaĥiano?). En 1795, okaze de la tria disdivido de Pollando-Litovujo, Bjalistoko estis aneksita de Prusujo, sed en 1807 la urbo devis esti cedita al la Ruslanda Imperio, kiu administris ĝin ĝis 1915 (do, Zamenhof naskiĝis ekster „Kongresa Pollando“!). Kiel Zamenhof sciigis, en 1859 lia naskiĝurbo Bjalistoko apartenis al la gubernio de Grodno. Kun la rapida industriiĝo de la urbo alvenis en Bjalistokon amaso da judoj, kiuj konsistigis ĝis la fino de la jarcento 66-70 procentojn de la loĝantaro, kompare kun 18-20% da poloj, 8% da rusoj, 6% da germanoj kaj 2% da blankrusoj (ĉ. 1860-1914). Do, Bjalistoko fariĝis esence juda urbo.<sup>18</sup> En 1873 la familio Zamenhof forlasis Bjalistokon kaj translokiĝis al Varsovio (kiu estis okupita de la rusoj). En 1915 la germanoj okupis Bjalistokon, sed la 19an de februaro 1919 ili forlasis kaj cedis ĝin al la polaj aŭtoritatoj. Dum la pola-rusa milito, la 28an de julio 1920 la urbo estis okupita de la bolŝevikoj, kiuj malaperis la 22an de aŭgusto, tiel ke la pola reĝimo estis restarigita. En 1931 la urba loĝantaro konsistis el poloj (51%), judoj (42%), rusoj (3%), germanoj (2%), blankrusoj (0,5%). En novembro 1939, la urbo kaj vojevodio estis

<sup>15</sup> Ĉi tiuj estis la motivoj, kial Zamenhof verkis la „Hilelison“ (plej unua versio de 1901).

<sup>16</sup> La litovoj nomas Bjalistokon Balstogė. Vd. la malnovan blazonon de Bjalistoko, kiu enhavas kaj la polan kaj la litovan simbolojn, sub <http://www.polen.net/uploads-polen/2010/04/Bialystok-wappen-polen.png>. Ĝi same estas la blazono de Podlaĥio, vd. [http://de.wikipedia.org/wiki/Woiwodschaft\\_Podlachien](http://de.wikipedia.org/wiki/Woiwodschaft_Podlachien).

<sup>17</sup> Detalojn vd. ĉe A. Dobroński: *Białystok. Historia miasta*. 2a eld. 2001, pp. 12, 18. Mapojn kun la koncernaj limoj vd. sub [http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/b/bb/Polska\\_1386\\_-\\_1434.png](http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/b/bb/Polska_1386_-_1434.png),

[http://pl.wikipedia.org/wiki/Wielkie\\_Księstwo\\_Litewskie#mediaviewer/File:Lithuanian\\_state\\_in\\_13-15th\\_centuries.png](http://pl.wikipedia.org/wiki/Wielkie_Księstwo_Litewskie#mediaviewer/File:Lithuanian_state_in_13-15th_centuries.png), [http://pl.wikipedia.org/wiki/Wielkie\\_Księstwo\\_Litewskie#mediaviewer/File:Poland\\_and\\_Lithuania\\_in\\_1561.PNG](http://pl.wikipedia.org/wiki/Wielkie_Księstwo_Litewskie#mediaviewer/File:Poland_and_Lithuania_in_1561.PNG).

Bjalistoko ne estas indikita, ĉar en tiu tempo ĝi ankoraŭ ne oficiale ekzistis kiel urbo. Situacio en la 18a jarcento: [http://d.wiadomosci24.pl/g2/0a/64/4f/95942\\_1241266855\\_9991\\_p.jpeg](http://d.wiadomosci24.pl/g2/0a/64/4f/95942_1241266855_9991_p.jpeg).

<sup>18</sup> Ankaŭ en la ĉapitro pri la periodo inter 1865 kaj 1914 de sia libro *Białystok. Historia miasta*. 2a eld. 2001, A. Dobroński magre traktis la judan historion de tiu urbo. Zamenhof estas menciita sed ne aparte honorita kiel judo.

alkroĉitaj al la Belorusa Socialisma Soveta Respubliko. Post la kvara disdivido de Pollando en aŭgusto/septembro 1939 kaj la sekva sovetia okupacio de la orienta teritorio de Pollando,<sup>19</sup> ĉ. 3000 bjalistokanoj estis deportitaj al Kazahio kaj Siberio, de kiuj la plimulto pereis en la sovetia gulago. Entute la sovetia teroro de tiu periodo, kiu furoris en orienta Pollando, kostis 430-440'000 viktimojn. En junio 1941 la urbo estis okupita de la germana armeo kaj integrita en aparta bjalistoka distrikto (kun Grodno).<sup>20</sup> Dum la dua mondmilito la juda loĝantaro de Bjalistoko estis persekutita, engetigita, murdita aŭ deportita al aliaj regionoj (kie ili pereis ĉefe en la koncentrejoj kaj neniigejoj de Treblinka, Majdanek kaj Aŭŝvico) kaj en principo ĉesis ekzisti en Bjalistoko (en 1948 vivis en tiu urbo ankoraŭ proksimume 520 judoj). En julio 1944 la urbo estis okupita de la sovetia armeo kaj, post la militfino, en 1945 transdonita al komunisma Pollando, kie ĝi fariĝis la ĉefurbo de samnoma vojevodio.<sup>21</sup>

Mi aldonis tiujn indikojn por montri, ke naci-socialismo, komunismo kaj pola naciismo, kiuj purigis la terenon de nedezirataj naciaj minoritatoj, efike 'laboris' en Bjalistoko (kaj aliloke). La etnografiaj kaj kulturhistoriaj spuroj de la pasinteco do estas grandparte forviŝitaj, kvankam en la ĉirkaŭaĵo de Bjalistoko, precipe en vilaĝoj, vivas belorusoj, tataroj kaj ortodoksoj, dum en 1997 en Bjalistoko mem vivis ankoraŭ 5 judoj.<sup>22</sup> Post tiuj historiaj klarigoj pri la ŝanĝiganta aparteneco de la naskiĝurbo de L.L. Zamenhof restas la demando: Al kiu Bjalistoko fine apartenas, kies posedaĵo kaj kia urbo ĝi estas? Certe, Bjalistoko ne estas nur-pola urbo, kvankam la oficiala retujo de la urbo tion ŝajnigas (vd. <http://www.bialystok.pl>). La historio estis, krom kruela, ankaŭ ne sufiĉe honesta kun Bjalistoko, fakte ĝis hodiaŭ.<sup>23</sup>

Similan historian sorton cetere spertis en principo ankaŭ la urbo Grodno, kie Zamenhof vivis inter 1893 kaj 97 kaj kiu hodiaŭ situas en Belorusio.

## II. SUBJEKTIVAJ FAKTOROJ

### 1. Pri la identeco(j) kaj kulturaj heredaĵoj de L.L. Zamenhof

Post tiuj klarigoj pri la historio, kiuj espereble sufiĉas por montri kial Zamenhof ne estis kaj ne povis esti polo kaj do ne povas esti nomata aŭ konsiderata kiel polo, mi turnas min al la originaj fontoj, kiuj montras kiel Zamenhof mem vidis kaj difinis sian identecon. En la verkaro de LLZ ekzistas kelkaj taŭgaj citaĵoj, kiuj lasas la leganton ekster dubo, kiu/kio Zamenhof estis kaj kiu/kio li ne estis. Tio koncernas ĉefe lian judecon, rusecon kaj ankaŭ lian polecon, pri kiu la poloj kaj la Esperanto-propagando insistas kaj fieras. En la sekvo ni analizu tiujn unuopajn identecojn, radikojn aŭ heredaĵojn, laŭ la disponeblaj citaĵoj, kiujn Zamenhof postlasis en sia verkaro.

#### *Hebrea identeco:*

En siaj leteroj, artikoloj kaj paroladoj L.L. Zamenhof ripete donis klarigojn pri sia etna identeco, lingva kaj kultura aparteneco, kaj pri siaj motivoj kial li kreis Esperanton. Li emfazis, ke li estas nek ruso nek katoliko aŭ luterano, sed ke li estas ano de la hebrea (juda) „nacieco“, kaj ke fakte li nomas sin „ruslanda hebreo“ (ruse: ruskij aŭ rossijskij evrej). Tion li klarigis al Alfred Michaux en letero de la 21a de februaro 1905. Jaron poste, la 28an de februaro 1906, li konfirmis en letero al Teodor Ĉejka: „Nacio – Ruslanda hebreo“. Al la organizantoj de la 8a Esperanto-mondkongreso en Krakovo Zamenhof mesaĝis (la 14an de februaro 1912), ke „laŭ mia deveno mi alkalkulas min al la gento *hebrea*“. La senperaj motivoj kaj radikoj de Esperanto kaj de la hilelismo aŭ homaranismo (oni ne forgesu ankaŭ ĝin, kvankam la esperantistoj ignoris tiun tekston kaj la komunistoj kondamnis ĝin kiel „reakcian mistikon“) estas serĉendaj en la judeco de Zamenhof. La judeco de Zamenhof konsistigis la rektajn kondiĉojn kaj estis la ĉefa kaŭzo kial li kreis „neŭtralan“ lingvon kaj „neŭtralan“ religion (aŭ etikon aŭ moralon) unuavice por la

<sup>19</sup> Mapon vd. sub <http://www.ivrozbiorpolski.pl/de/img/mapa1-5.gif>. Mapon de la lingva situacio en 1937 vd. sub <http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/6/60/Poland1937linguistic.jpg>.

<sup>20</sup> Mapon vd. sub [http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/6/60/Okreg\\_bialystok\\_1942.png](http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/6/60/Okreg_bialystok_1942.png) kaj <http://www.zonu.com/images/0X0/2011-05-27-13794/Third-Reich-1944.png>.

<sup>21</sup> Mapon de Pollando en 1945 vd. sub <http://slupcagenealogy.com/PicMe/LocImage003.jpg>.

<sup>22</sup> Laŭ Tomasz Wiśniewski: Jewish Bialystok And Surroundings In Eastern Poland. A Guide for Yesterday and Today. Massachusetts 1998.

<sup>23</sup> Detalan skizon pri la historio de Bjalistoko en Esperanto vd. sub <http://www.planlingvoj.ch/Bjalistoko.pdf> kaj [http://pl.wikipedia.org/wiki/Historia\\_Bialekostoku](http://pl.wikipedia.org/wiki/Historia_Bialekostoku).

judoj (kiel skribite en la „Hilelismo“). Sen la ekzistado kaj la okupiĝado pri la „juda demando“, Zamenhof, kiu ankaŭ estis cionisto, ne estus veninta al la ideo krei sian novan lingvon. Ke la judeco estis la ĉefa motivo por krei internacian lingvon, li mesaĝis al Alfred Michaux la saman 21an de februaro 1905, al kiu li ankaŭ skribis, ke la judeco implicis ĉe li jam en la infanaĝo la revon pri la unuiĝo de la homaro, tipe juda sinteno. Universaleco estas unu el la judaj maksimumoj. Al Edward Baff li eĉ skribis la 10an de marto 1907, ke li ĉiam opiniis, ke la judoj bezonas pli forte ol aliaj popoloj komunan „neŭtralan“ lingvon, ĉar la ekzistantaj lingvoj estas fremdaj por ili. Kaj Zamenhof resumis, ke li ne havintus la ideon krei internacian lingvon, se li ne estintus „judo el la geto“. Sed Zamenhof, kiun la judoj nomis Lejser, ne estis blinda juda naciisto. Malŝatante ĉian politikan naciismon kaj ŝovinismon, inkluzive de la juda, li transformiĝis de cionisto al speco de sennaciisto. Estas ankaŭ vere, ke Zamenhof avertis la esperantistojn, ke oni ne tro forte devus akcenti lian judecon, ĉar tio povus, en tempo de forta antisemitismo, malhelpi la disvastiĝon kaj propagandon de Esperanto. Sed tio ne estas kialo por prisilenti, subpremi aŭ ignori la judecon de Zamenhof.

Lige kun la juda identeco necesas ne forgesi, ke Zamenhof scipovis la hebrean lingvon kaj utiligis la jidan lingvon, precipe kun la patrino, kun la judoj de Bjalistoko kaj Varsovio kaj kun siaj pacientoj kaj klientoj.

Malgraŭ la klopodo vidi Zamenhofon kiel liberpensulon, ateiston, agnostikulon aŭ framasonon (cetere li mem donis kelkajn signalojn por tiaj interpretoj), nature, la aparteno al la juda gento estas kutime intime ligita kun juda religio. En tio ankaŭ Zamenhof ne formis escepton. Dum sia tuta vivo li restis iel ligita al la juda religio, kio respeguliĝis en la profundeco de la instruoj de la hilelismo-homaranismo, kiun Zamenhof senĉese prilaboradis ĝis 1913. Lige kun la temo de la religio li skribis al la sama Ĉejka en 1906, la jaro de la unua eldono de la hilelismo-homaranismo, ke „mia religio“ estas „hebrea-hilelista“.<sup>24</sup>

En la unua periodo de Esperanto ne malmultaj judoj en diversaj landoj adoptis kaj propagandis Esperanton, kaj en la intermilita tempo estis ĉefe judaj esperantistoj, kiuj daŭrigis kaj flegadis la zamenhofan heredaĵon en Varsovio.

#### ***Rusa identeco:***

La judeco de Zamenhof ne ekskludis aliajn identecojn. Al la islanda esperantisto Þorsteinn Þorsteinsson Zamenhof skribis (en 1906): „Mia gepatra lingvo estas la rusa“, kaj al Teodor Ĉejka li klarigis en la sama jaro, ke „la lingvo de mia gepatra domo estis la lingvo rusa“. El tio ni konkludas, ke kun la gepatroj (precipe patro), en la lernejo kaj kun la aŭtoritatoj Zamenhof praktikis ĉefe la rusan lingvon. Siajn ĉefajn traktaĵojn kaj artikolojn Zamenhof skribis en la rusa lingvo, ankaŭ la origina eldono de la *Unua Libro* (1887) aperis en la rusa lingvo. Laŭ propra eldiro, Zamenhof „amis“ la rusan lingvon, kiu estis la lingvo de lia edukado, kiel li skribis al Michaux. Li lernis ĝin kun „granda plezuro“ kaj revis iam fariĝi „granda rusa poeto“ (ŝajnas, ke li preferis la rusan verkiston Nikolaj Nekrasov). El la rusa lingvo Zamenhof tradukis verkaĵojn de Anton Del’vig (1892) kaj de Nikolaj Gogol’ („Revizoro”). Sed en la lernejo li ial ricevis nur la noton 4 (bone) por la rusa lingvo. Por studi medicinon Zamenhof, kiu laŭ rusa kutimo oficiale nomiĝis Lazar’ Markoviĉ, veturis al Moskvo kaj nur poste finis la studojn en Varsovio. Ĉiuj tiuj cirkonstancoj indikas, ke Zamenhof estis praktike tre proksima al la rusa mondo. Sed baldaŭ Zamenhof „konvinkiĝis, ke mian amon oni pagas per malamo“. Kiel konate, en la 2a Esperanto-mondkongreso de 1906 en Ĝenevo Zamenhof akre kritikis la „teruran staton en Okcidenta Rusujo“<sup>25</sup> pro la „batalado pure politika“ rilate la subpremado de la „homaj liberecoj“ kaj de la „rajtoj de homo“, do li tre bedaŭris la situacion de la lando, en kiu li vivis, Ruslando.

#### ***Pola identeco:***

Kiel Zamenhof skribis krome al Michaux, li flue parolis nur en tri lingvoj: Rusa, pola kaj germana (laŭ tiu sinsekvo). Al Þorsteinsson li konfirmis, ke en Varsovio li pli kaj pli uzadis la polan lingvon. Sed sian polecon, kiun la poloj volis trudi al li, li obstine neis, distanciĝante de provoj apartenigi lin al la pola gento. Klartekston pri tio li parolis en letero al la organiza komitato de la 8a Esperanto-mondkongreso en Krakovo de la jaro 1912 (14a de februaro), en kiu li ekskludis sian polecon, skribante: Kaze ke oni „nepre bezonos paroli pri mia persono, Vi povas nomi min ‘filo de pola lando’, ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo (kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min ‘polo’, por ke oni ne diru, ke mi – por akcepti honorojn – metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas“. Kaj li aldonis jenan frazon: „Ĉar, por

<sup>24</sup> Komp. ankaŭ kun [http://www.planlingvoj.ch/13\\_HIPOTEZOJ\\_PRI\\_ESPERANTO\\_2012.pdf](http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf), punkto 1.

<sup>25</sup> Kiam Zamenhof en Ĝenevo 1906 parolis pri Bjalistoko, li ne uzis la terminon „Pollando“, sed „Okcidenta Rusujo“.

eviti ian malĝustan paŝon, Vi eble bezonas scii, al kiu popolo mi *mem* alkalkulas min, mi sciigas Vin, ke laŭ mia politika-religia *konvinko* mi estas nek polo, nek ruso, nek hebreo, sed mi estas partiano de la 'homaranismo' (ne miksu kun 'kosmopolitismo').“ En sia Hilelisma analizo de 1901 Zamenhof prezentis la konvinkon, ke judoj neniam povus fariĝi poloj, kaj ke en certaj polaj rondoj oni renkontas antisemitisman modelon. Jen, ĉi tiuj eldiroj trafte ilustras kaj pravigas la klarigojn supre faritajn sub 1.2. Ĉar la Esperanto-propagando eltranĉis tiujn frazojn, praktike neniu, nek polaj nek alilandaj esperantistoj mem, konas ilin, kaj ankaŭ ne deziras koni ilin, ĉar ili kontraŭdiras la mitojn, legendojn kaj stereotipojn, kiujn oni ĝenerale kredas pri la „polo“ Zamenhof kaj pri Esperanto kiel produkto el Pollando. Krom tio, laŭ la logiko de la teorio, kiun Zamenhof reprezentis koncerne la „neŭtrale-geografiajn“ landnomojn, kiujn li realecfremde proponis por la ŝtatoj, oni apenaŭ povas imagi, ke la „tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj“ kaj „sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto“ nomiĝu Pollando, sed „Varsovilando“ aŭ simile, do ne portu la nomon de unusola gento. Ĉi tiu sennaciisma sinteno de Zamenhof certe ne povis esti akceptebla por la polaj naciistoj kaj patriotoj (al kiuj apartenas ankaŭ parto de la polaj esperantistoj). Do, la trudo de la poleco al Zamenhof estas neakceptebla el pluraj kaŭzoj, ĉar tiu sinteno estas malhonesta kaj hipokrita.

### ***Litov(i)a identeco:***

Interesaj estas la litovaj konsideroj pri la identeco de Zamenhof. Kvankam al la sama Porsteinsson li klarigis en 1906, ke li ne estas ruso sed „Rusujano“, dum sia parolado en la londona Guildhall en 1907 Zamenhof vokis: „Vi staras nun antaŭ miaj okuloj, mia kara Litovujo, mia malfeliĉa patrujo, kiun mi neniam povas forgesi, kvankam mi forlasis vin kiel juna knabo. Vi, kiun mi ofte vidas en miaj sonĝoj, vi, kiun neniam alia parto de la tero iam povos anstataŭi en mia koro, vi atestu, kiu vin pli multe, pli kore kaj pli sincere amas.“ Ktp. En la kazo de lia Litovujo, kiu estas termino komprenenda en la senco de la Litovujo-nocio en „Pan Tadeusz“ de A. Mickiewicz („Litwo! Ojczyzna moja!“), temis pri la historia litova grandprinclando, kiu kune kun la pola reĝlando formis la „Respublikon de Ambaŭ Popoloj“ (pole: Rzeczpospolita Obojga Narodów, litove: Abiejų Tautų Respublika / Žečpospolita), kiun la judoj nomis „Lite“ aŭ „Lita“, en kiu vivis litoviaj judoj (t.n. „litvakoj“), kiuj parolis la nordorientan version de la jida lingvo („litviŝ“).<sup>26</sup> Ĉi tiuj litoviaj judoj formis apartan etnografian grupon ene de la ruslanda (aŭ orienta) judaro kaj distingiĝis de la polaj judoj en pluraj rilatoj. Ankaŭ Zamenhof apartenis al la litovia judaro (litvakoj). Kiel supre montrite, Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof, estis fondita de litovoj kaj situis ĝis la jaro 1795 en la litova grandprinclando. Krome, alian rilaton kun Litovio Zamenhof havis tra la bofamilio: Kiel konate, lia edzino Klara Zilbernik devenis el Kovno (Kaunas), urbo en Litovio (kiu en tiu tempo estis parto de la ruslanda imperio same kiel Pollando), kiun Zamenhof vizitadis, kaj kiu tiam havis fortan judan karakteron, same kiel Bjalistoko (kaj Grodno). En la litovia kamparo (Veisiejai), kie Zamenhof prov-restadis kiel kuracisto dum pluraj monatoj, lia nova lingvo alprenis konkretan formon. Tiuj cirkonstancoj igis la konatan litovan pastron kaj esperantiston A. Dambrauskas rimarkigi, ke la eltrovinto de Esperanto estas „proksima al Litovio“, kvankam li ne estis litovo. Pro tio la litovoj respektas „Liudvikas Lazaris Zamenhofas“ (sic) ĝis hodiaŭ kiel filon de Litovio, kvankam li havis nenion komunan kun la litova gento (aŭ etno) nek kun la litova nacia afero.

### **Finaj rimarkoj kaj konkludaj konsideroj**

Nu, kiajn finajn rimarkojn ankoraŭ necesas fari post tiuj abundaj kaj evidentaj klarigoj ? Unue, por eviti eventualan miskomprenon, kiu facile povus aperi: Per la supraj atentigoj mi tute ne intencis detrui la ludon de la esperantistoj kaj malhelpi la polojn proklami Esperanton kiel nacian heredaĵon de Pollando. Mi celis antaŭ ĉio levi la diskuteblajn kaj diskutindajn punktojn, kiuj estas eventuale ligitaj kun la proklamo de Esperanto kiel pola nacia heredaĵo. Kompreneble, la poloj havas la plenan liberecon kaj suverenan rajton mem decidi, ĉu ili volas proklami Esperanton kiel nematerian nacian heredaĵon; ĉiu devas mem morale respondeci pri propraj decidoj.

Certe, oni ne povas nei, pridubi aŭ kontesti, ke Esperanto kaj Zamenhof estas historie ligitaj kun Pollando, kie Zamenhof vivis, laboris kaj mortis, eĉ se Pollando kiel ŝtato ne ekzistis, kiel mi montris supre. En tiu senco eblas diri, ke Zamenhof kaj Esperanto ja originas el Pollando. Pollando restas Pollando,

---

<sup>26</sup> Mapon de la teritorio de la litvaka kulturo vd. sub <http://www.lzb.lt/en/2015-version-of-litvak-culture-map-published-in-vilnius>.

eĉ se aliaj potencoj okupis ĝin kaj spite al la oftaj ŝanĝoj de la landlimoj en la historio, kiuj ankaŭ influis la pensmanieron, la ideojn, la identecojn kaj la verkaron de L.L. Zamenhof. Alia vero estas ankaŭ, kaj mi esperas, ke mi klare kaj nemiskomprenible povis montri aŭ eĉ pruvi ĝin, ke *Zamenhof ne estis polo* kaj ke *Esperanto havis nenion komunan kun la nacia pola afero* (oni povas diri, ke la poloj eĉ ne tre interesiĝis pri la zamenhova projekto). Do, el tiu vidpunkto konsideri Zamenhofon polo kaj Esperanton pola nacia kultura heredaĵo ne tute konformas al la historia vero, ne estas tute honeste kaj devas esti almenaŭ relativigita. Mi jam verkis plurajn artikolojn pri ĉi tiu temo, eĉ tutan libron, pri la problemoj de la identeco(j) de Zamenhof.<sup>27</sup> Do, mi povis nur ripeti kaj resumi la esencon, kiun mi jam aliloke skribadis. Antaŭe, ĉefe A. Holzhaus kaj N.Z. Maimon okupiĝis pri la identecoj de Zamenhof kaj J. Dietterle kaj I. Kanji publikigis la koncernan zamenhofan verkaron, kiu liveris la nekontesteblajn faktojn kaj pruvojn pri la originaj fontoj de Esperanto kaj pri la identeco(j) de ĝia aŭtoro. Mi mem sekvas la skolon de tiuj aŭtoroj kaj eldonistoj kaj la skolon de la vero en la historio, ĉar la skolon de la pola naciismo kaj Esperanto-propagando mi konsideras nefidinda fuŝa kaj malhonesto.

Do, malgraŭ la nekontesteblaj historiaj faktoj, kiuj faras, ke oni ne povas konsideri Zamenhofon kiel polon kaj Esperanton kiel polan aferon, aŭ polan nacian heredaĵon, kaj malgraŭ la argumento, ke ĉe la diversaj personaj identecoj de Zamenhof temis pri lia pure privata afero, ŝajnas, ke la kredo pri la poleco de Zamenhof kaj Esperanto ankoraŭ longe vivos kiel 'sankta' dogmo en la konscio de la homaro, ĉar la Esperanto-propagando efike laboris dum jardekoj. Tiu propagando tordis, reinterpretis kaj ignoris bazajn faktojn kaj verojn, tiel ke la provo revizii tiun konvinkon aŭ kredon havos verŝajne nulan ŝancon kaj estas eĉ kondamnita fiaski, dank' al la propaganda fanatiko kaj ideologia fundamentalismo de la esperantistoj, kiuj sukcese sabotas kaj malhelpas tian revizion.

Do, eĉ se la poloj decidis proklami Esperanton kiel polan nacian heredaĵon, ili ne povis fari tion tute sen pura konscienco, ĉar la prezentitaj faktoj kaj la historio mem montras alian situacion. Draste dirite, ĉe la farita decido temas pri kruda malrespekto de la volo de Zamenhof kaj nakceptebla uzurpado de Esperanto kiel pola afero.

Ankaŭ ne estas certe, ke aliaj popoloj tiom ĝojos pri la pola decido. La listigo de la diversaj identecoj de Zamenhof ja celas ankaŭ ilustri, ke Esperanto estas iomete ĉies kaj samtempe nenies posedaĵo, tute en la senco de ĝia kreinto. La proklamo de Esperanto kiel pola nacia heredaĵo do subfosas la aserton de la Esperanto-propagando, laŭ kiuj Esperanto estas nenies propraĵo, kaj ĝi eĉ pli kontraŭdiras la faman konkludon de Zamenhof, kiu diris, ke „mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj“.

Cetere, kiel svison interesas min jena demando: Kiu povas fari tian proponon kaj kiu povas decidi pri ĝi en Pollando? Ĉu sufiĉas, se iu ajn entuziasma pola parlamentano kaj iu ajn meritoserĉa pseŭdo-asocio el la pola civilsocio proponas ion ajn al la ministro pri kulturo kaj nacia heredaĵo, kiu kvazaŭ persone akceptas (t.e. havas la kompetencon akcepti) la proponon kaj registras ĝin en la nacia listo, helpe de „landaj kaj eksterlandaj sponsoroj“, kiel oni ie povis legi, aŭ ĉu en Pollando tamen ekzistas ankaŭ ia demokratia procedo (ekzemple parlamenta aŭ registara decido)?

Se mi bone komprenis, la pola agnosko celas helpi apogi la planon de iuj lobiistoj en posta fazo proponi Esperanton al UN akceptiĝi kiel nemateria kultura heredaĵo de la homaro. Nu, pri tia nobla intenco oni povas nur ĝoji kaj konsenti. Restas la espero, ke tiuj kampanjoj ne vane pafas en la malplanan horizonton kaj ne restos en la memoro kiel dubinda propaganda gago, sed ke ili vere kondukos al substancaj sekvoj kaj rezultoj por la lingvo Esperanto mem.

© Andreas Künzli, decembro 2014, [www.planlingvoj.ch](http://www.planlingvoj.ch)

---

<sup>27</sup> Vd. Andreas Künzli: L.L. Zamenhof (1859-1917) Esperanto, Hillelismus (Homaranismus) und die „jüdische Frage“ in Ost- und Westeuropa. Harrassowitz. Wieshttp://dovidkatz.net/WebAtlas/0\_Lite\_A2.htm baden 2010. ISBN 3447062320. Kiel montras ĉi tiu komento ([http://www.planlingvoj.ch/Repliko\\_Zamenhofbiografio](http://www.planlingvoj.ch/Repliko_Zamenhofbiografio)), tiu libro estis sufiĉe malbone akceptita en la Esperanto-movado, verŝajne ĉar ĝi traktis la aferojn tro proksime al judaj temoj kaj aŭdacis kritike analizi stereotipojn, mitojn kaj legendojn. Vd. ankaŭ mian ĉi-rilatan artikolon en *Franca Esperantisto*, n-ro 425/novembro 1991, kiun mi verkis kiel resumon de miaj samtemaj universitataj M.A. (lic. phil.)-studoj.



## Ricevitaj komentoj

Estimata, ni poloj rajtas nomi Ludovikon Zamenhofon - polo, ĉar naskiĝis sur nia pola tero, kie li vivis kaj agis dum tuta sia vivo, kaj tie ĉi, en nia pola ĉefurbo Varsovio li estas entombigita, kaj tio ke Pollando honorigis kreitan de li la internacian lingvon Esperanton, kiel la nacian kulturan heredaĵon de Pollando estas por ni epoka grandioza evento, pro kiu ni estas grandmezure fieraj, sed tio ne signifas, ke Esperanto estas nur pola propraĵo, ĉar nomo " la Internacia Lingvo Esperanto atestas ja per tiuj vortoj pri si mem, ke ĝi estas la propraĵo de la tuta mondo. Do vi ne devas malprave furiozi de kolero, ke Pollando kiel la unua ŝtato en Eŭropo kaj Mondo faris tiun agrablan geston por tutmonda esperantistaro, aprezante finfine tiom alte la ĝis nun neaprezitan, tiun belan trezoron, kia estas interkompreniĝo kaj vivo en paco fare de la tuta mondomaro.

J.E. PL

---

La artikolo estas bone verkita kaj gxuste argumentita, sed treege banala enhave, cxar cxiuj faktoj el gxi estas konataj al cxiu normala esp-isto ekde (esp-a) infanagxo. Eble, tio (parte) ne koncernas esp-istojn polajn, kiuj strebas "alproprigi" Zamenhof-on al si - sed tiam vi devas vin turni precipe al ili, cxar por cxiuj ceteraj sxajnas, ke vi arde defendas la tezon, ke duoble du estas kvar.

Ridetante,  
G.N., RUS

---

Kiel ĉiuj ankaŭ li havis multajn grupidentecojn inter kiuj estis pluraj etnaj kiel la hebrea, rusa, pola, litova... sed ankaŭ esperantista. Li tiutempe eĉ ne konsciis ke tio estas normala kaj ke identecoj dependas de "vasta eduko" en ĉirkaŭaĵo en kiu oni certan cempon vivas. Li neniam parolis pri sia identeco, ĉar li ne ligis tiun sian apartenon al tiu E-grupo sed al la "homaro"... Sed ĉio tio ne rilatas al la pola decido pri kultura heredo. Pollando povas kun pravo proklami Esperanton kiel sia kultura heredaĵo, ĉar ĝi ekestis sur pola teritorio kaj estis elirpunkto por la disvastiĝo. Tie al la baza E-movado kaj E-kulturo ne influis nur Zamenhoh sed ankaŭ unuaj tradukistaj granduloj kiel Grabowki kaj Kabe. La pola proklamo estas prava kaj samkiel poloj povas proklami la verkaron de Chopin sia kulturheredaĵo, ili povas ankaŭ E-on. Kompreneble poste E iĝis fenomeno kiun kunkreis homoj el multaj landoj kaj etnoj de la mondo kaj ĝuste pro tio E-on kiel sian kulturheredaĵon povas proklami ankaŭ multaj aliaj landoj. Ekzemple Kroatio havas multajn kaŭzojn por postuli tion baze de tio ke pluraj E-verskistoj estis kaj estas kroatoj, ke multaj okazaĵoj Esperantaj okazis en tiu lando ktp, kaj same povas fari svisoj kaj, kaj, kaj... Tial mi vidas nenion problemon en tiu proklamo, sed gravan komencpunkton por postuli la samon en aliaj landoj kaj akironte tion en kelkaj pliaj landoj postuli kiel unua sekva paŝo agnoskon de Esperanto kiel minoritata lingvo de EU.

T. Z., HR

---

ĉu vere tiel malfacile por vi estas kompreni, ke temas pri **ESPERANTO KIEL LA PORTILO DE LA ESPERANTA KULTURO** kaj ne E-o mem kiel tia. Do pri kia uzurpado vi pensas? Mi NE KOMPRENAS!!! Ne indas perdi la tempon! Bonvolu ne respondi. Por mi sufiĉas tiaj "revelacioj". Dankon.

B.A., PL

---

Koran dankon pro via sendaĵo. Mi plene konsentas kun via vidpunkto kaj miras pri jubilo akompananta la nunan okazaĵon.

W.P., PL

---

Mi tre atente tralegis vian artikolon "Kial Esperanto ne estas nur pola nacia heredaĵo" kaj volas esprimi mian miron, kial vi ne trovis la gravajn informojn pri la historio de Bjalistoko. Vi skribas: "Bjalistoko, la naskiĝurbo de Zamenhof, estis fondita de litovoj kaj situis ĝis la jaro 1795 en la litova grandprinclando." Vi volas pravi tion per "mapo kun la koncernaj limoj", kiu temas pri la jaroj ... 1386-1434, do nenion diras pri la stato ĝis la jaro 1795. Vi prave rakontas pri la fondo de la urbo de litova duko/princo en la 14/15-a jc., prave mencias, ke ĝi ankoraŭ longe ne estis urbo, ke la vilaĝo iĝis urbeto nur en la 17-a jc., sed vi ne mencias ke urbajn rajtojn ĝi ricevis de la pola reĝo Johano la 3-a Sobieski ĉ. la jaro 1692, kiam ĝi ekde ĉ. 120 jaroj ne plu apartenis al la Granda Duklando Litova (aŭ kiel vi ĝin nomas: la litova grandprinclando). En la jaro 1569, tuj antaŭ ol estis decidita la Lublina Unio

(unuiĝo de Krono de Pola Regno kaj Granda Duklando Litova), Bjalistoko kaj la tuta Podlaĥio transiris de Litova Duklando al Krono, kiu post tri monatoj iĝis la pola parto de la Unio. Mi ne komprenas, kial la esplorantoj de la Zamenhofa vivo (kaj Bjalistoka historio kiel lia naskiĝloko) prisilentas la fakton, ke inter 1569 kaj 1795 Bjalistoko kaj la tuta Podlaĥio apartenis al Pollando, ne plu al Granda Duklando Litova. Do, la objektiva historiisto nepre devas informi, ke ĝis la tria dispartigo de la Respubliko de la Du Popoloj (1795) Bjalistoko ekde 200 jaroj apartenis al Pollando (al la pola parto de Respubliko de Ambaŭ Popoloj) kaj estis dum longa tempo floranta centro de pola kulturo. (...) Sen tiaj historiaj informoj via laboraĵo estas forte neobjektiva. (...) La tempoj kaj diversaj dependecoj en Pollando estis tiutempe pli komplikaj ol vi povas pritaksi tion el Svislando. (...) Mi ne scias, ke vi skribas viajn artikolojn por vi mem kaj ne interesas vin ajna opinio de serioza leganto. Kial do vi metas ilin en la reton kaj aldonas vian retpoŝtan adreson? Viaflanke sufiĉis skribi, ke vi ne estas interesita pri ajna opinio. (...)

Tamen la mapoj, kiujn vi aldonis, daŭre montras la staton antaŭ la jaro 1569, nur nun estas pli multaj, por pli forte fiksi en la leganto la impreson, ke Bialistoko havas antaŭ ĉio litovajn radikojn, kaj la ununura mapo, kiun vi aldonis pri tio, kion mi petis, temas pri la 18-a jc. Kial? Kial vi ne aldonis tre klaran mapon "Rzeczpospolita po Unii Lubelskiej, 1569r." Tio tute ne kontentigas min kaj mi opinias tion iom malhonesta. Vi informas min pri via ampleksa artikolo "Bjalistoko", sed leganto de ĉi tiu artikolo ne ricevas la saman informon. Krome, la unua versio jam "iris en la mondon" kaj nenio atentigas, ke nun en via retpaĝo troviĝas nova versio.

Mi ne opinias, ke Zakrzewski kaj Grabowski konscie kaj malhoneste volis malvere "poligi" Ludovikon. La komplikeco de la historio komplikigas la sorton de unuopulo. Zamenhof certe ne estis trankvile feliĉa en tiu komplikeco. Vi konaskelkajn leterojn, vi ne konas hejmajn kaj amikajn interparolojn kun Zakrzewski aŭ Grabowski. Vi ne povas nomi ilin malhonestaj. Ni nur scias, ke Zamenhof dum longa tempo helpis al Grabowski per konsiloj traduki "Sinjoro Tadeo"-n. Sed iliaj interparoloj dum tiu komuna tradukado ne estas konataj. (...) Pola nobelulo ne povis nomiĝi Ignatij Grinewitzky, des pli ne Игнатий Иоахимович Гриневичкий laŭ la rusa vikipedio. [Ignatij Joaĥimoviĉ Grinjevicki]. Li nomiĝis Ignacy Hryniewiecki (1855-1881), [legu: ig'naci hrinje'vjecki].

Z.M., PL

---

Mi ne tra legis viajn tekstojn, nur la titolon, kaj jam mi povas respondi. Jes, Zamenhof neniel estis polo. Li estis "ruslanda hebreo", kion li mem tiel diris. Sed "ano de Pollando" li estis. Due, Eo vere ne estas NUR pola heredajxo, Sed jes, ghi estas ANKAU pola, char ghi estas tutmonda, kaj Pollando estas parto de la tuta mondo. Kaj pola ghi estas almenau iomete pli, ol ghi estas ekz. japana... Ne estas problemo ke Pollando tiel decidis. Iun tagon ankaŭ aliaj shtatoj deklaras Esperanton sia. Pollando estas nur la unua pasho. Kaj per iu pasho oni devas komenci... La dua pasho eble estos EU, eble ghuste dank' al Pollando. Do, mi pruvis, ke via titolo pravas, sed ankaŭ tion, ke vi ne devas grumbli...

K.D., HR

---